

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Francland aj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 7 fkoj
Bonfara : 12 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

NOVEMBRO - DECEMBRO

1968 6

KULTURAJ KAJEROJ

1968 NOVEMBRO - DECEMBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thebaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represajo.

ENHAVO

El Gresillon :
Kio okazis en 1969.

Esperanto tra la mondo — A. Frangeul

Mezepoka vilaĝo (II) — L. Chassériaud

Ĉu vi konas Tiĉinon (I) — P. Métivier

Vidocq, Napoleono de la polico (I) — E. Motillon

Tigro-Bebo parolas (II) — H. Lauwick (trad. S. Guillot)

Rakontoj :
La Hirundo — Istvan Fekete (trad. A. Szekely)

Komplika kristnaska-arbo — Lassi (trad. K. Väätänen)

Por via distro
Nia konkurso — P. Chevalier

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzajojn

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

El Gresillon

Kio Okazos en 1969

Kiel kutime la Konsilio de la Kulturdomo kunvenis en oktobro por studi la programon de la venonta jaro. Ĝi respondis jese al la peto de S.F.E.L.O. organizi studperiodon okaze de la finjaraj ferioj. La 1969-programo multe similos la antaŭajn. Tamen la Konsilio enkondukis kelkajn novajn erojn.

La kastelo estos malfermita en februaro por du samprogramaj sinsekvaj periodoj (16.2-23.2 kaj 23.2-2.3) laŭ propono de Sino Vincent. Temos pri Seminario por kurs- kaj grup-gvidantoj. Tiaj seminarioj ankoraŭ ne estis organizitaj sed ili estas necesaj ĉar en multaj lokoj la bonvolemaj gesamideanoj ne ĉiam konas la taŭgan manieron gvidi grupon kaj estus kontentaj scii « kion la aliaj faras ». Jen okazo por ili kompari siajn spertojn kun la spertoj de kolegoj.

Pro la fakto, ke la Komuna Franca-Germana Kongreso okazos dum Pasko, la Kultura Semajno (ĉijare la oka), tradicie organizita de U.F.E., estas prokrastita ĝis julio. Anstataŭe de ĝi la Kulturdomo planis kursperiodon de la 6-a ĝis la 12-a de aprilo.

De la 29-a de junio ĝis la 7-a de septembro okazos kvin diversaj periodoj. Ĝis la 13-a de julio la programo proponas du paralelajn aktivajojn : Esperanto- kursojn kaj kurson de « ĉiutaga » franca lingvo per esperanto. La 8-a Kultura Semajno okazos tuj poste (13-20 julio) kun la kutima programo : iniciado al la instruo de la lingvo, studo de tekstoj, aplikado, prelegoj. La Kulturaj kaj Turismaj Internaciaj Ferioj daŭros de la 26-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto. La programo entenos diverstemajn prelegojn prezentitajn de diversnaciaj samideanoj, diskutojn kaj ekskursojn. De la 3-a ĝis la 24-a de aŭgusto la Esperantistaj Kulturaj Semajnoj proponos tri kursojn de esperanto (komencan, praktikan kaj superan) kaj diversajn aktivajojn : bindadon de libroj, korbofaradon, iniciadon al fotoarto kaj, la unuan fojon, iniciadon al teatro-arto. Fine, de la 24-a de aŭgusto ĝis la 7-a de septembro U.F.E. organizos en Gresillon studperiodon (kursojn) kaj seminarion por kurs- kaj grupgvidantoj similan je tiu okazinta en februaro.

Ni estas certaj, ke ĉiuj programeroj renkontos sukceson. Ni provis proponi sufiĉe diversajn aktivajojn por plezurigi kaj interesi ĉiujn. Ni esperas, ke, kiel kutime, la kastelo estos plej ofte plenplena, ĉar « ju pli da amikoj en rondo, despli da plezuro por ĉiuj ».

La programo estos havebla fine de decembro kontraŭ respondkupono.

Tuj mendu :

POR LA PRAKTIKANTOJ

(pluaj paŝoj al vivanta lingvo) **de P. BABIN**

La libro, kiun vi bezonas por via perfektiga kurso

Prezo : 8,50 f. f. aŭ 15 respondkuponoj

NASKIĜO DE ESPERANTO-DOMO

Historio de la fondado de Grésillon

Prezo : 3,50 f.f. aŭ 6 respondkuponoj

M.C.E. Grésillon, 49 - BAUGE — Pk. Nantes 1485-39

Esperanto tra la Mondo

Universala Kongreso. — En Helsinki sub la alta protektado de D-ro Kaleva Kekkonen, prezidanto de Finnlando, de la 26-a de Julio ĝis la 2-a de Aŭgusto. La turisma parto entenos : antaŭ la kongreso 3-tagan ekskurson al Laponujo kaj 3-tagan ekskurson al la orienta laga distrikto ; dum la kongreso 3 tuttagajn ekskursojn ; post la kongreso 4-tagan ekskurson al Leningrad. La oficiala post-kongreso okazos en Turku ; ankaŭ infana kongreseto estas antaŭ-vidita.

Junulara Kongreso okazos en Tyrcsö, antaŭurbo de Stockholm de la 3-a ĝis la 10-a de Aŭgusto.

SAT-Kongreso kunvenos venontjare en Novi-Sad (Jugoslavio).

Fervojistoj kunvenos en Avignon (Francio) de la 17-a ĝis la 23-a de Majo.

Germana-franca komuna kongreso okazos dum Pasko (4-8-a de Aprilo) en Strasburgo. La gejunuloj renkontiĝos en la Junulardomo de St Martin (Germanio) je 100 km. de Strasburgo (30-a Aŭgusto-2-a Septembro). Por tiu lasta renkontiĝo la adreso estas : H.D. Platz, Maikammerstr. 21, D-6731 St Martin.

Turista kongreso en Szeged (Hungario), 15-25 Julio, kun 3-taga postkongreso en Hodmezövasarhely. Adreso : S-ro E. Szekely, Lenin krt. 61, Szeged.

Renkontiĝo por naturamikoj en Abaliget (Hungario) 14-24-a de Julio. Adreso : Baranya DEK de HEA, Pf. 2, Pecs 1.

Pedagogia Internacia Seminario en Szeged (Hungario) 10-20-a Aŭgusto. Adreso : Csongrad — departementa komitato de HEA, Pf. 227, Szeged.

Internaciaj esperanto-skisemajnoj 15-a de februaro ĝis 7-a de marto, inter Salzburg kaj Zell am See (Aŭstrio). Skribi al : S-ro J. Geroldinger, Marcusgang 7, A-4020 Linz.

Restadoj dum la tuta somero en Internacia Esperanto-Somerumejo en Primoŝten (jugoslavia adriatika marbordo). Skribi al : Primoŝten, kod. Ŝibenik, Jugoslavio.

Internaciaj feriaj Esperanto-kursoj en la internacia Altlernejo de Helsingor (Danio), 20-26 de Julio. Prospekto havebla ĉe : S-ro Friis, Ingemannsvej 9, DK-8230 Abyhöj, Danio.

Kutimaj kurs — preleg — kaj turism-periodoj en la Kulturdomo de Gresillon, Baugé-44, Francio.

El Israelo : Esperanto-Ligo en Israelo, kiu ĵus ricevis novan belan ejon en Tel Aviv, str. Rembrandt 18, decidis krei internacian somerumejon je 6 km. de Natania, 26 km. norde de Tel Aviv, apud la maro por Julio 1969. Por informoj de nun skribu al : D-ro Maschler, str. Hapardes 11, Tel Aviv.

El Pollando. — Radio-Varsovio dissendas nun en esperanto, tri fojojn ĉiutage : laŭ mezeŭropa tempo : 6.30 h. (200 m.), 16.30 h. (25,34 m., 31,50), 23.30 h. (25,09 m., 31,45 m., 42,11 m., 50,04 m.). Petu la programon en esperanto al Radio Varsovio, esperanto fako, kaj informu pri la aŭskultaj kondiĉoj. Vi povas ankaŭ aŭdigi muzik-pecon kaj bondezirojn al viaj eksterlandaj amikoj.

El Francio. — La « Nova Universitato » (antaŭmilita Laborista Universitato) aldonis ĉijare al siaj lingvo-kursoj (franca, rusa, germana, angla lingvoj) esperanto-kurson. Tiu kurso okazas ĉiuvendrede.

Semajno de internacia amikeco. — La UEA estraro decidis iniciati la aranĝon ĉijare de « Semajno de internacia amikeco », kiu okazos de la 16-a ĝis la 22-a de Februaro 1969. « Esperanto » de oktobro donas ĉiujn informojn pri la aranĝo. Temas pri la interŝanĝo de salutkartoj, donacetoj kaj provo interesi la ĝeneralan publikon kaj la gazetaroj pri la afero. La Semajno celas konkretigi la internan ideon per originala agado. Informiĝu kaj vidu kion vi povas fari loke.

Eldonajoj. — En la serio Oriento-Okcidento de UEA aperis nova tradukaĵo el Japanio : « El la vivo de Syunkin » de Tanizaki Zyun'Itiro. Temas pri du teatraĵoj kaj du noveloj.

Estas interese noti ke en la antaŭe aperinta libro « El Japana Literaturo » estis interalie la novelo » Dancistino de Izu » de Kawabata Yasunari, la nova Nobel-premiito pri literaturo. Nova pruvo de la kultura valoro de esperanto.

D-ro Pol Denoel, profesoro en Universitato de Belgio ĵus publikigis broŝuron titolitan « l'Esperanto dans l'Enseignement ». La celo estas alporti al la instruistoj precizajn kaj taŭgajn respondojn al la kutimaj kontraŭdiroj.

Lastaj naskitoj de Stafeto :

« Somermeznokta sonĝo » de W. Shakespeare, tradukita de K. Kalocsay.

« Norda Naturo » (poemoj » de Hildo Dresen.

« Vivo de Gandhi » de Edmond Privat.

MEZEPOKA VILAĜO EN LA DUDEKA JARCENTO

(2-a parto)

Sed ni revenu en nian vilaĝon « Palmyrosa ». Ne nur belajn tapiŝojn, sed ankaŭ meblojn vi povos aĉeti en la mezepoka vilaĝo, jen ĉe la antikvaĵisto, kie bela juna virino mezepoke vestita kun alta konusforma ĉapo sur sia blonda hararo, afable atendas vin, jen ĉe la meblofaristo, kiu laboras antaŭ viaj propraj okuloj, kaj al kiu vi povas mendi vian plej deziratan meblon aŭ meblaron, laŭ la modeloj tie ĉi videblaj.

Ĉu vi bezonas korbon, ĝardenajn seĝojn, fotelojn aŭ tablon? Jen la korbisto plektas antaŭ vi, por vi, la flekseblajn trunketojn de la vimeno por realigi la plej diversajn plektaĵojn, kiajn vi povas imagi.

Dum vi interesege rigardas lian laboradon, du junaj trobadoroj, ŝajne venintaj el sia suda provinco, paŝas malantaŭ vi sur la strato por iri al la placo de la vilaĝo kaj tie kanti siajn poemojn.

Al la nazo nun alvenas bona odoro de kuiraĵo : tio devenas de la ne malproksima kuirejo de la rostisto, pri kiu ni jam parolis, ankaŭ de tiu de la porkaĵisto, en kies butiko pendas la belaj brunaj ŝinkoj kamparaj kaj la allogaj kolbasoj diversspecaj. Sed ni ne tro pensu pri la manĝaĵoj, ĉar restas ankoraŭ multo videnda.

En sia malgranda laborejo, la latunaĵisto zorge marteletas pecon de ruĝa kupro, kiu ankoraŭ ne havas sian definitivan formon, sed certe fariĝos artoplena kupraĵo, se oni antaŭjuĝas laŭ ĉiuj artaĵoj, kiuj plenigas la bretojn de la butiko.

Jen la presisto, kiu per tre antikva presmaŝino ligna, presas sur malnovaspekta papero per gotikaj literoj ĉiamajn proverbojn aŭ devizojn el malnovaj verkoj eltiritajn, kaj kiujn arte ornamos lia najbaro, sperta miniaturisto, per delikataj buntaj desegnaĵoj.

Kial tiom da rigardantoj antaŭ tiu budo en la apuda strato? Ni tien iru. Tie laboras la vitrofadenigisto. Iom riĉe vestita, ĉar li vere estas artisto, filo kaj nepo de vitristo, li dektrijara knabo eklernis sian metion. Li venis, onidire, de Hamburgo, por ĉi tie labori. Per sia ŝalmo li fadenigas la vitron kun granda lerteco, kaj ĉiuj rigardantoj admiras la artajn multkolorajn bestojn, luksaĵetojn kaj aliajn bagatelaĵojn, kiujn li tiel sperte realigas el la malfacile laborata vitro.


Precipe virinoj ariĝis antaŭ la puntofaristino ; ili atente rigardas kaj admiras ŝiajn laborproduktojn same kiel ŝian grandan lertecon, dum la virojn allogis la laborado de la lignoŝuisto, kiu permane boras kaj ornamas belformajn lignoŝuojn.

Tute alia sed same interesaj montriĝas la laboro de la medaliisto, kiu lerte ĉizas dezirindajn medalojn kaj aliajn juvelojn, kaj tiu de la medajlisto, kies tre diversaj produktaĵoj estas indaj je la plej famaj artmuzeoj.

Sed ni ne povas paroli pri ĉiuj butikoj vidindaj kaj ĉiuj metiistoj aŭ artistoj, kiuj en ili laboradas. Mi nenion rakontis pri la skulptistoj, kiuj antaŭ la vizitantoj skulptas el ŝtono aŭ ligno belegajn figurojn ; pri la feraĵisto kaj liaj diversaj artaĵoj : subpladoj, lumstangoj, murlampoj, ŝtuparaj aŭ balkonaj balustradoj, k.t.p. — Multaj paĝoj estus necesaj por nur iomete diri pri ĉiuj mirindaĵoj videblaj dum la vizito de tiu mezepoka vilaĝo « Palmyrosa ».



Eble, pro mia ĝisnuna priskribo, vi iomete forgesis, ke ni estas ne en vere mezepoka urbeto sed en nuntempe konstruita vilaĝo, kie ne nur troviĝas mezepoke vestitaj metiistoj, sed ankaŭ promenas turistoj vestitaj laŭ la nuna modo, kiuj preskaŭ ĉie miksiĝas kun la ŝajne mezepokaj laboristoj, trobadoroj aŭ kamparanoj sur la stratetoj de la vilaĝo.



Kompreneble, ĉar tiu ĉi estas ĉiujare konstruata por la bela sezono ne el ŝtono sed el pli malfortaj materialoj, oni ja klare vidas, ke ĝi estas artefarita vilaĝo, kiu kelkfoje pensigas pri teatra dekoro. Ĝi estas konstruita en granda pinarbaro norde de la moderna banurbo Royan ; tial al la propraj odoroj, pri kiuj ni parolis, iomete miksiĝas, dum la sunbrilaj tagoj de la somero, la bona odoro de la pinarboj, kio revokas la vizitantojn al la realeco. Tamen tiu vilaĝo estas tute vidinda, precipe pro la laborado de la diversaj metiistoj kaj la belaj realaĵoj, kiujn ebligas ilia sperteco, ilia lerteco kaj ankaŭ ilia amo por la bele farita laboro. Kiu ajn estas tiu laboro, kiu ajn estas la uzata materialo, ŝtono, ligno, fero, kupro, ŝtofo aŭ alia, ĉie kaj ĉiam vidiĝas veraj artaĵoj permane faritaj ; tial, rigardante la laboradon kaj ties artan rezulton, oni emas pripensi kaj kompari la tiamajn kaj nuntempajn labormanierojn, iom bedaŭrante la iompostioman malaperon de tiuj sendependaj metiistoj, samtempe laboristoj kaj artistoj, kiuj mem kreis siajn modelojn kaj mem realigis ilin kun la plena intereso, kiun oni nature havas por sia propra kreaĵo.

L. CHASSERIAUD.



ESPERANTISTA KULTURDOMO « GRESILLON »

NIA PROGRAMO

En Februaro :
(16.2 - 23.2 kaj 23.2 - 2.3)
Seminario por kurs- kaj grup-gvidantoj

En Aprilo :
(1.4 - 12.2)
Rektmetoda kurso de esperanto
Praktikado de la lingvo

Dum la Somero :

(29.6 - 13.7)	Esperantaj Studoj La franca lingvo per esperanto.
(13.7 - 20.7)	Oka Kultura Semajno de U.F.E.
(20.7 - 3.8)	Kulturaj kaj Turismaj Internaciaj Ferioj.
(3.8 - 24.8)	Kulturaj Esperantistaj Semajnoj.
(24.8 - 7.9)	Esperanto-kursoj Seminario por kurs- kaj grup-gvidantoj.

Ekskursoj al la kasteloj de la Loire, Angers, Nantes, Le Mans, la nokta spektaklo de la kastelo de Le Lude.

Petu tuj informojn :

Esperantista Kulturdomo
Kastelo Gresillon
49 - BAUGE - Francujo

ĈU VI KONAS TIĈINO-N ?

Tiu, kiu la unuan fojon vizitis tiun teritorion, senmanke spertis agrablajn surprizojn. Eble, baldaŭ vi trapasos tiun regionon, kaj, en tia kazo, estus pli bone ke mi silentu kaj ke mi lasu al vi la plezuron fari mem la malkovron. Sed, pardonu min, ĉar estas malfacile rezisti je la deziro rakonti pri amata regiono, kie mi vivis sufiĉe longatempe por tie min senti hejme en kvazaŭ de ĉiama patrolando.

Do, ni vojaĝu kune kaj ni komencu la esploradon. Jen, ni estas en Svislando. Komfortaj, akurataj trajnoj elektraj aŭ flugmaŝinoj alkondukis nin meze de tiu montara lando kie, ĉie dissemitaj brilas la lagoj kun trankvilaj akvoj. Kompreneble, kutime ni kunportas en la menso ideo-imagojn pri glaciejoj, neĝkovritaj pintoj, kaj alpaj paŝtejoj.

Oni ĝenerale antaŭscias, ke en Svislando regas klimato sufiĉe rigora kun longa vintra periodo. Ni, do, rapide forlasos la internan landon por konatiĝi kun la kantono « Tiĉino », kiu kuŝas plej sude kaj ŝajnas apartigita ero de la cetero de Svislando. Fakte, antaŭ unu jarcento, kiam ne ekzistis la fervoja tunelo sub la San-Gotardo montaro, la regiono Kantono Tiĉino estis tute izolita de la resto de la lando dum pli duono de la jaro ĉar, tiutempe, malbona alpa ŝoseo super 2.000 metrojn alta estis la sola vojo irata de la ĉevala poŝta veturilo. Estis la heroa epoko, se ne la ora. Feliĉe, tiusence, la teknika progreso laboris utile kaj ni sidas komforte en la rapida vagonaro, kiu kondukos nin al la suda mirolando spite al ĉiaj veteroj. Jam, esper-ĝoje streĉiĝas la koro de la vojaĝantoj. Ni veturas en la mallumo kaj ekkonscias pri suprenirado ; « ĉu la Gotardo tunelo », demandas vojaĝantoj ? Ne, gesinjoroj, ankoraŭ ne, ĉar antaŭ ol eniri la veran longan tunelon, ni trairas tutan antaŭ-sinsekvon. Ni diru Galerian Komplekson, kies plej mirinda punkto estas la heliko-forma parto kiu en la vilaĝo Wassen trifoje rondiras altiĝante.

Trifoje ankaŭ la trajno aperas ekstere kaj ĉiufoje montriĝas la beleta, elstare situanta preĝejo de la vilaĝo, unue ĝi aperas super nia vidlinio poste samnivele kaj je la tria rondiro ĝi ŝajne profunde staras en abismo.

De nun adiaŭ ŝvebantaj nigraj nuboj, gigantaj rokaj muroj, ŝaŭmantaj akvofaloj ; ĉi-foje ni penetras definitive en la mallumon. Senhalte, same energie, rapide la trajno enŝoviĝas en unu el la duobla tunelo kaj nur pli forte aŭdiĝas la fulm-tondra rulado.

La vojaĝantoj kontrolas sian horloĝon : 12 minutojn daŭros la tenebra vivo, dume preskaŭ ĉesas la konversacioj ĉar la bruo fariĝas ne tolerebla kaj ni fide atendas nian liberiĝon. Jen la helo, kvazaŭ nova tagiĝo, sed multe pli intensa, forta sunbrilo, lazura ĉielo kaj senretene ĝojkrioj eksplodas ! Jes, la kontrasto estis tiel forta, ke eĉ la plej sulkita mieno senvole malstreĉiĝas. Ni atingas Tiĉino-n kaj ni haltas ĉe la unua stacidomo nomata Airolo. Ni ne trapasis landlimon, tamen ni estas en alia mondo. Komenciĝas la teritorio de la Itala lingvo. La fervojaj kontrolistoj tuj komencas uzi tiun lingvon ĉe la fino de la tunelo (ili uzos kompreneble ankaŭ la du aliajn naciajn lingvojn se bezone, sed de nun, la unua estas la itala, la loka lingvo). Plie, el niaj kupeoj, ni povas legi la nomojn de la butikoj kaj oficejoj grandlitere skribitaj en la loka lingvo. Ankaŭ okulfrapa estas la stilo de la malnovaj konstruajoj. Ni estas ĉi-tie ankoraŭ ĉe la plej norda pinto de tiu kojnoforma regiono, kiu limiĝas tie kontraŭ la kolosa alpa arko, limo plej natura, sed jam manifestiĝas la trajtoj de la nord-itala civilizo de kies teritorio tiu regiono estas rekta geografia alligaĵo. La vilaĝo Airolo situas je 1.000 metra altitudo, estas do ankoraŭ la regno de la abioj, kiuj ofte ĉi-tie devas alkroĉiĝi akrobate ĉe la abruptaj flankoj de la roka montaro, ĉe la bordo de abismo, kie ili estas la dankindaj protektantoj kontraŭ lavangoj kaj rokofaloj. La deklivo estas forta. Kelkajn kilometrojn malantaŭe sed pli ol mil metrojn supre naskiĝis la rivero Tiĉino, kiu donas sian nomon al la regiono.

Tie la rivero havas torentan reĝimon kaj ĝi kuregas suden al sia destino, al la malproksima Adriatiko. Sed, kiel ĉiuj vivovojoj tiu fluanta ekzisto estos longa, varia kaj kaprica. Paralele, ni daŭrigas nian trajnan vojaĝon ĉar ni celas atingi la koron de tiu nova mondo. Pli saĝe nun ol la naturaj fortoj kiuj senbride galopas al la valo, la potenca lokomotivo komencas bremsi utiligante sian propran falopuŝon por produkti kvanton da elektra kurento. Meze de naturbelaĵoj allogaj ni ankaŭ devas admiri tiujn perfektajn fervojajn servo-instalaĵojn ! Kiuj estas la sentimaj, lertaj anonimuloj kiuj fiksis la fosto-turojn, portantajn la altan Tensian Kurenton, inter la rokoj super la abismoj ? Ni rapide malsupreniras, la apude fluanta rivero larĝiĝas, la abioj estas for kaj nun elstaras la kaŝtanarboj ; la paŝtejaj kampoj fariĝas pli vastaj kaj subite jen la vitoj...

Ni atingis la urbeton Biasca. Tie la pejzaĝo montras pli tipan Tiĉinan karakteron. En Tiĉino, la granito ludas tre gravan rolon. Ĝi estas konstrua materialo, kiun oni retrovos ĉie sub diversaj formoj. Ĉi-tie, en la regiono de



Biasca, por citi nur la ĉeflokon de la distrikto, la unua renkonto kun la granito estas tre impresa.

La vinberkulturado estas unu el la ĉefaj produktoj

de la loko kaj la vitoj estas subtenataj nur de granitaj fostoj kiuj estas 2 metrojn altaj super la tera nivelo. La vito-kampoj etendiĝas je pluraj kilometroj en laŭba sistemo tiel ke oni povas facile marŝi inter la vicoj kaj sub la vitbranĉoj sen klini la dorson. Kaŝtanarbaj rondaj stangoj ligas horizontale la suprajn partojn de la granitaj fostoj. Tiucele la kapo de la fostoj finiĝas per duoncirkla kavo, kiu retenas la kaŝtanlignan stangon. Estas tre longa sinsekvo de tiuj vito-galerioj tiel, ke oni diras ŝerce en la loko, ke la katoj de Biasca povas kuri sur vito-laŭboj ĝis la alia vilaĝo sen tuŝi la teron. Tiuj granitaj fostoj estas tre pezaj kaj ne riskas faligon fare de la vento. Same, en tiu loko (Iragna-Biasca) granitaj platoj unu metron altaj stare borderas la vojojn. Sub tiu formo la nura abunda uzo de la granito donus severan aspekton kaj atestas pri la proksimeco de la montaro sed ni jam estas en la valo kaj riĉaj kreskaĵoj donas mildan noton.

Ni baldaŭ estos meze de la maizo-kampoj ; tie de ĉiam, kiel en norda Italujo, oni kulturis la maizon por fari la « polenta-n » kaj ĉe ĉiuj domoj la maizo-spikoj pendas dekoracie. Jam en Biasca ni vidas la unuajn palmojn apud la domoj, ankaŭ kreskas ĉi-tie la kaki-arbo, kies fruktoj unuavide similas al la oranĝoj. Ili maturiĝas en novembro kaj oni rikoltas ilin post la kompleta falo de la folioj. Je tiu epoko ili ŝajnas estis oranĝoj kaj jam pro tio trompis multajn vizitantojn el la nordlandoj.

Ni haltu momenton en Bellinzona. Tiu urbo kun 30.000 loĝantoj estas la ĉefloko de la kantono Tiĉino, la sidejo de la Parlamento de tiu Respublika-federacia unuo de la federala ŝtato Svislando. Ekzistas ankoraŭ ekster la urbo, bone konservataj, tri kasteloj fortikigitaj. Ili estas ligitaj per remparoj, kiuj sur la deklivoj ĉirkaŭas la urbon kaj donas al ĝia ekstera panoramo iom severan mezepokan aspekton sed feliĉe la interno estas pli akceptema kaj entenas vizitindajn palacojn. Bellinzona estas grava stacio de la fervoja trafiko situanta ĉe unu el la plej uzata linio de Eŭropo, kiu kunligas Skandinavion kun suda Italio. Pasas tie ankaŭ la same grava vojo kaj de tie ni provas elekti inter rapida daŭrigo suden kaj flanka esplorado okcidenten. Tiu lasta kondukos rekte kaj baldaŭ al la sopirata celo. Ni jam preskaŭ atingis la plej malaltan altitudon de Svislando : 220 metroj super la marnivelo en Bellinzona.

Post 20 km. la rivero Tiĉino finos sian « riveran » Svisan ekziston, ĉar ĝi eniros la lagon « Maggiore ». De nun, do, ĝia fluo kvankam ankoraŭ rapida ne plu estas torenta. Ni troviĝas nun meze de ebenaĵo, ĉar ni fidele sekvos nian riveron ; ĝi logike meritas nian pluan akompanon ĉar ĝi ja estas la ĉefa arterio de la regiono al kiu ĝi donis sian nomon. Ni ĉeestis ĝian evoluon ĝian rapidan progreson kaj kutimiĝis al la diversaj prejzaĝoj kiuj identiĝas al ĝia maturiĝanta personeco. Baldaŭ estos la kulmino de ĝia sendependa fluanta vivo, sed ni pliplongigu momenton nian restadon sur la bordoj de ĝia vojo. Antaŭ 150 jaroj oni komencis korekti la fluon de la rivero en tiu ebenaĵo ĉar antaŭe ĝiaj multaj branĉoj senzorge vagadis kaj inundis tiun ebenan koridoron larĝan ĉirkaŭ 6 km. Antaŭ la korektado de la rivero, la regiono suferis pro malario ĉar somere estas tre varme kaj abundas moskitoj energioplenaj.

Nun la ebenaĵo estas riĉa agrikultura regiono, kie oni kultivas precipe maizon, tabakon, tomatojn, kaj estas farmoj kun multaj melkovinoj. Sed la grundo ne taŭgas por kultivi tritikon. La kultivado de tiu cerealo estis provata plurfoje sed la rezulto ne estis kontentiga. Krom tomatoj, (kiuj estas la ĉefa legoma produkto), oni ankaŭ kultivas sukcese multajn aliajn specojn de legomoj.

La dekstra bordo, norde, de tiu koridoro altiĝas rapide kaj abrupte, ĝis la altitudo de 550 Metroj, kelkafoje ĝis 600 metroj ; tiu norda flanko estas kovrita de vitoj, kie la laboro estas tre malfacila. Serpentumaj vojetoj kondukas al tiuj pitoreske situantaj etaj vitokampoj sed poste, nur piede la homo devas porti ĉiujn ilojn kaj mane plugi. Super tiu altitudo komenciĝas la bosketoj de kaŝtanarboj ; ĉe la suda flanko prezentiĝas monto nur 500 metrojn alta, fakte estas pasejo « Monte Ceneri » kiu anoncas la finon de la Alpoj. Dum prezentiĝas, trajnorapide, tiuj sinsekvaj bildoj de pejzaĝo sub la pli kaj pli helblua ĉielo ni pli frue ol antaŭvidite veturas laŭlonge de la lago « Maggiore ». Se antaŭ kelkaj horoj ĉe la suda elirejo de la Gotardo tunelo la intense blua ĉielo provokis ĝojkriojn, ĉi-tie, alvenante en Locarno oni silentas pro miro, kun kvazaŭ spir-reteno pro admiro.

Dum la lastaj minutoj ni veturis inter vilaoj kaj hoteloj ne ekster-ordinare luksaj, tute ne, sed la parkoj prezentas ne kutiman vegetaron inter kiu oni rekonas multajn specojn de la Mediteranea klimato.

En tia loko oni haltas sendiskute, tute nature, kun la ĉefa intenco restadi tiel longe kiel necesos por esplori tiun mirindan naturon.

Certe, sur nia terglobo estas multaj lokoj, urboj, fame konataj pro sia beleco kaj situo kaj ne estas troige diri, ke la urbo Locarno meritas honoran lokon inter ili. Apenaŭ for de la stacidomo, duobla vico de altaj oleandroj, kiuj kreskas tie ekstere sen timo pro frosto, kondukas al la lago.

La urbo, etendiĝas laŭlonge de la konkoforma golfo kaj grimpe konkeras ĉiam pli altajn poziciojn sur la ĉirkaŭantaj montoj. Sed, ĉe la tute apuda lagobordo estas instalitaj tre interesaj kaj agrablaj publikaj ĝardenoj, kie meze de zorgeme flegataj florbedoj aplombe elstaras gigantaj magnolioj (magnolia grandiflora), kamforarboj, mimozoj kaj palmoj, estas eĉ variaj specimenoj de la speco : (phenix canariensis) belega palmarbo kiun oni kutime renkontas nur en vitrodomoj (oranĝerioj) en la mez-Eŭropaj landoj. Verdire oni iom ŝirmas tiun lastan specon en la parkoj de Locarno sed la fakto, ke ili estas plantitaj ekstere jam de multaj jaroj atestas pri la mildeco de la klimato. Fakte, laŭ klimata vidpunkto, tiu regiono ĉirkaŭ la Lago Maggiore estas vera oazo de preskaŭ subtropika naturo je kelkaj paŝoj de la Alpaj glaciejoj.

Tute unikaj geografiaj kondiĉoj favoras tiun situacion

(daŭrigota).

P. MÉTIVIER.

Ĉu vi pagis vian abonon ?

Ne atendu plu ! Pagu al via peranto aŭ al :

Pierre BABIN, 13, bd de la Chauvinière — 44 - NANTES

Pk. Nantes 2 813 61

Laborpunito farigînta ŝtata policestro

VIDOCQ, NAPOLEONO DE POLICO

(19a jarcento naskis abundon da eksterordinaraj homoj. La pli stranga el ĉiuj estas sendube Vidocq (pr. vidok'). Rakonto pri lia vivo estas pli pasiiga ol ĉiu imagita policromano. Naskiginta en honesta metiista familio, li farigis laŭvice, forfuginta laborpunito, heroa soldato de la franca 1-a Respubliko, skermomajstro, oficiro, kolportisto, kaperisto, kontrabandisto, komercisto, tajloro, estro de la ŝtata policestro, privata detektivo.

Sendube, skizo de lia aventuroplena vivo interesos niajn legantojn.)

LA KNABO

Dum la nokto de la 23a de julio 1775, en Arras, urbo de norda Francujo, naskigis filo en la hejmo de iu panfaristo nomita Vidocq. Ĉar tiam, potenca fulmotondro kun intensa pluvego skuadis la urbon, la akuŝistino asertis ke, tio estas signo, ke la ĵus naskita Francisko havos vivon plena de agitado. La antaŭdiro de la maljunulino realigis ĝis grado tute ne konceptebla.

La knabo estis altstatura, korpe lerta kaj pli ol ordinare fortika. Li ankaŭ estis inteligenta, eĉ malica, kaj tre batalema. Li rapide akiris superecon super siaj samaĝuloj, sed ankaŭ famon kiel « knabaĉo ».

UNUAJ AVENTUROJ

Lia patro instruis al li sian metion. Kompreneble li devis ankaŭ liveri panon al la klientaro. Dum siaj vagadoj tra la urbo, li konatigis kun senlaboraj kaj dibocaj junuloj. Fine, estanta deksep-jara, li rompis la monkason de la patro. ŝtelis la monon, kaj forfugis ĝis la haveno Calais. Li intencis enŝipiĝi tie kaj veturi ĝis Ameriko. Sed tie, li estis siavice prištelita. Senmona, senŝirma, malsata, pentema, li decidas reiri hejmen kaj peti pardonon de la gepatroj. Por vivteni sin, kaj akiri la vojaĝrimedojn, li dungigas ĉe iu foiristo, kies trupo konsistas el unu pajaco, unu akrobato kaj kelkaj simioj. En tiu ofico, li ricevis pli da batoj ol da pano. Sed li eklernis kelkajn akrobataĵojn, ĵonglaĵojn kaj iom el la ŝminkarto. Tiuj konoj estis poste tre utilaj al li.

Lacigita de la malbona traktado de la mastro, li forkuras, Feliĉe li trovas ĉarlatanon, kiu bezonas helpanton por porti liajn pakaĵojn. Plie, la vagado de tiu ĉi individuo proksimigos lin al Arras. Senhezite, la junulo akceptas la proponon. Tiel, post peniga vojirado kun multaj malagrablaĵoj, Vidocq revenas en la naskigurbo. Ne tre facile, li ricevas pardonon de la gepatroj kaj eklaboras en la familia panejo.

SOLDATO

Ve ! la bonaj decidoj de la juna Francisko ne longe daŭris, Post ne longe, li foriras kun iu aktorino. Kelkajn semajnojn poste, la sireno trovas alian akompananton. Aplombe, Vidocq revenas en Arras, kaj petas de sia patro permeson soldatiĝi. Tio estis la sola ebla solvo, ĉar la gepatroj ne plu povis fidi liajn promesojn pri pliboniĝo. Pro lia staturo kaj fortikeco, li estas tuj akceptita, kvankam li ne estas jam dekok-jara, Ŝajne, li ne montriĝis tre disciplinema, sed tre kverelema. Kio havigis al li punojn kaj duelojn. Tiuj ĉi estis ĝenerale favoraj al li, pri liaj skerma lerteco kaj fortikeco. Li ja estis kuraĝa kaj sentima. Li tion laŭdinde pruvis dum la famaj bataloj de Valmy kaj Jemmapes. Li kredeble povus fariĝi oficiro, se li ne estus vundita je unu kruro.

Reveninte en Arras por resaniĝo, li trovas la urbon subpremata de la sangavida Teroro tiam reganta. Tio ne malhelpas, ke li frekventu la tiean dibocularon. Unu el liaj « amikinoj » trudas, ke li edziĝu je ŝi, Ŝajnigante gravediĝon, kies respondecon li ne povas malakcepti.

Lia permeso por resaniĝo finigas. Sed li ne reiras al sia regimento, kaj forkuras en Belgujon. Tie li spertas multajn aventurojn — ne ĉiuj honorigaj — pro kiuj, li revenas en Francujo. En Lille, li estas arestita dum interbatalo pro virino. La polico eltrovas, ke li estas la dizertinto Vidocq kaj malliberigas lin por juĝo.

Tiu okazaĵo devis decidi pri lia tuta estonta vivado, pro strangaj cirkonstancoj.

EN MALLIBEREJO

En la malliberejo, Vidocq sukcesas ricevi apartan ĉambron. Iom senpripense, li konsentas, ke du aliaj maliberuloj, Grouard kaj Herbault uzu lian ĉambron por redakti peticion favore al alia arestito, nomita Boitel. Efektive, tiu estis liberigita. Sed, oni konstatis, ke la liberiga ordono estas falsaĵo. Boitel, rearestita, asertas, ke la skribintoj estas Grouard kaj Herbault helpitaj de Vidocq. Spite de energiaj protestoj, la junulo estas kulpigita pri « falsofaro de aŭtentikaj kaj publikaj dokumentoj ». La afero estis grava, kaj nedubeble finigos per laborpuno.

Alivestite, Vidocq sukcesas fuĝi kaj sin kaŝas en la urbo. Hazarde, li estas rekonita kaj arestita. Sed lia afero grave plidanĝeriĝis. La « amikino », kiu havigis al li la oficiran kostumon dank' al kiu li forkuris, estis viktimo de murdoprovo. Pro diversaj koincidoj, ŝia amiko estas kulpigita pri ĝi. Malesperiga situacio ! Vidocq skribis en siaj memoroj : « Dudekkvar-jara, mi trovis min sub la ŝarĝo de duobla akuzo pri falsado kaj murdo, ne estante kulpa pri iu el tiuj du krimoj ! ».

Mallibereco kaj estonta laborpuno estas netolereblaj por la junulo. Aŭdace, li denove sukcesas forkuri ĝis Ostendo, de kie li povos forveturi en Amerikon. Tiu espero malsukcesas.

KONTRABANDISTO

Post nelonge, li estas senmona, sen legitimaj paperoj kaj senlabora. Por savi sian vivon, li trovas rimedon nur per dungiĝo en bando de kontrabandistoj. La metio ne plaĉas al li. Tial, tuj kiam, li havas sufiĉe da mono, li reiras al Lille. Sed dumvoje, li estas rekonita de du ĝendarmoj, unu fojon pli arestita kaj enkarcerigita en Douai. Kun aliaj malliberuloj, dum dumonata peniga laboro, ili traboras pasejon tra la muro de la malliberejo. Unu el ili kaŝis en sian anuson ujeton entenantan segiletojn. (Tiu procedo estis kutima ĉe la laborpunitoj). Ili do povis rompi la katenojn ilin ligantaj. Nun libera, Vidocq sukcesas dungiĝi en la armeo, ne kiel soldato, sed kiel helpa flegisto por la ĉevaloj. Malfeliĉe, li estis rekonita kaj denove arestita. Kaj li revenas en la malliberejo de Douai. Tie, alia provo de fuĝo malsukcesis. Fine, li estis juĝita kaj kondamnita je ok jaroj da punlaboro.

LA « ĈENO »

Pluraj provoj de forfuĝo malsukcesis. Post kelkaj monatoj, li estas kondukita al Bicêtre, proksime de Parizo, kie li estos alligita al la « ĉeno » de la kondamnitoj irontaj al la punlaborejo de Brest. La punitoj estas kunligitaj al fera kateno por formi tion, kion oni nomas la « ĉeno ». La viroj, parigitaj laŭ ilia staturo estas kunkatenitaj al dumetra kateno. Ĉe unu piedo, oni nitas ferbulon pezantan pli ol unu kilogramo. Ĉiu punito estas ligita al la « ĉeno » per la « kravato ». Vidocq ĝin tiel priskribas : « speco de fera triangulo, malfermebla je unu flanko per bolto-ĉarniro, kaj de la alia flanko per najlo fridmartelita ». Tiu « kravato » estis metita ĉirkaŭ la kolo de la « ĉenano » kaj la majlo estis nitita per martelo. Danĝera faro, ĉar la peza martelo svingiĝas tute proksime de la kapo, kiun subita movo povas frakasi. La punitoj estis tiel katenitaj laŭ unu « ĉenero » de 26 kondamnitoj, kiuj ne plu povis sin movi aparte. Post 24 tagoj da marŝado, la ĉeno alvenis en Brest.

FUĜINTA LABORPUNITO

Post kelka tempo, Vidocq sukcesas fuĝi el le laborpunejo, vestite per ŝtelita kostumo de monaĥino. Dank' al tiu fidinspira vesto, li povas iri ĝis Nantes. Tie, li retrovas konatulojn. Li ricevas helpon de ili, iom da mono kaj novajn vestojn. Certe ne pro kompato ; ĉar ili proponas al li partoprenon en ŝtelo de riĉa domo. Li ne rifuzas, sed tuj forkuras, intencante iri ĝis Arras por revidi sian patrinon.

BOVKONDUKISTO, INSTRUISTO, KAPERISTO

Bonvena ŝanco ebligas dungon ĉe brutovendisto, kiu konfidas al li kondukon de grego de bovoj ĝis Parizo. Vidocq fariĝis modela bovkondukisto, kaj enspezis sufiĉe grandan sumon. Li tiam iras al Arras. Sed la urbo estas danĝera restadejo por li. Foririnte, li estas gasto de vilaĝa pastro, kaj instruas al geknaboj la rudimentojn pri lego, skribo kaj katehismo. Tio ne povis daŭri. Pro ia amaventuro, li estas devigata forkuri. Li ankoraŭ iras en Belgujon. Post diversaj aventuroj, li alvenas en Rotterdam. Tie, li estas perfide kaj perforte « rekrutita » kiel maristo sur nederlanda kaperista ŝipo. Dum halto de la ŝipo en Ostendo, li estas rekonita, spite de lia tiama identeco : Duval, kaj kaptita. Kelkajn monatojn poste, li estas alkatenita al la « ĉeno » de kondamnitoj por la punlaborejo de Toulon. Tien la « Ĉeno » alvenis post plurmonata, plejparte pieda, terura vojaĝo.

DE TOULON ĜIS LYON

Tuj de sia alveno, Vidocq havis nur unu penson : forfuĝi. Malfacila afero, ĉar kompreneble, li estas konsiderata kiel danĝera ulo, jam fuĝinta, kaj li estis tre severe prigardita. Prepari forfuĝon for de la laborpunejo necesigas feran volon kaj longan pacienco. Li posedis ambaŭ ecojn. Lia unua zorgo estis mildigi la malfidon de la voktoj. Li do havis imitindan kaj neriproĉeblan konduton. Post kelka tempo, li petis permeson fabriki ludilojn el lignaj pecetoj. Li ricevis konsenton. Kaj li instalis veran laborejon kun aliaj kondamnitoj. La ludiloj, venditaj en la urbo, havigis al ili iom da mono. La gardado fariĝis iom malpli severa, ĉar punitoj okupataj per laboro ne povas pensi pri fuĝo... Iam Vidocq plendis pri kruraj doloroj. (Tio ne estis malofta pro la peza ferbulo, kiun la punitoj devis konstante trenadi). Li eniras en la hospitalo, kaj tie kaptas la konfidon de la kuracisto. Iun tagon, dum tiu ĉi estis faranta operacion, Vidocq malligas sian katenon, antaŭe segitan, prenas la redingoton, ĉapelon, bastonon kaj gantojn de la ĥirurgo ; surmetas botojn, perukon, surgluas vangharojn — akcesorojn de longe preparitaj — kaj kviete eliras tra la ĉefa pordo. La soldatoj kredas lin la doktoro, kaj li facile alvenas sur la straton. Sed li ne povas penetri en la urbon, ne havante la necesan verdan karton. Li foriras, preterirante la remparojn, kiam li aŭdas la tri kanonpafojn anoncantajn fuĝon el la punejo. Feliĉe alproksimiĝas enterigan procesion. Li sin ŝovas meze de la sekvantaro ; kaj ne rimarkite, povas foriri en la kamparo.

Vespere, li renkontas viron armita de fusilo. La fuĝinto baldaŭ ekscias, ke tiu homo estas membro de banditaro, kiuj rabas la vojaĝantojn. Li restas kun ili dum kelkaj tagoj, ricevas iom da mono, kaj foriras promesinte la sekreton. Li fine atingas la grandan urbon Lyon.

Li pensas ke tie, li povos sin kaŝi kaj trovi iun rimedon por vivteni sin. Sed li trovas bandon de ekskondamnitoj, liberigitaj aŭ fuĝintaj. Tia kunularo ne tre plaĉas al li. Li ne povas ne aliĝi al ili. Tamen, tio, kion li timis okazas. Pro malakordo, li estas denuncita kaj arestita. Kolerega kaj malespera, li petas aŭdiencon de la ĝenerala komisaro, denuncas siajn perfidajn amikojn kaj helpas por la aresto de aliaj krimuloj. « Tio, li diras en siaj memoroj, estis mia debuto en kariero tute nova por mi ». Kariero, kiu estos plene sukcesa, kvankam li atendis kelkajn jarojn antaŭ ol li definitive ĝin alprenis.

Rekompence, li ricevis liberecon kaj pasporton. Tiel, li facile iris ĝis Parizo, kaj de tie ĝis Arras.

(daŭrigota) E. MOTILLON.

Aŭto-memoraĵoj

Tigro-Bebo moderna aŭtomobilo, parolas

(2-a parto)

Ni atingas la nuntempan historion.

Jam estis « kurado de urbo al urbo » : Paris-Rouen ; Paris-Bordeaux. Levassor efektivigas tiun Paris-Bordeaux je meza rapideco de 24 km-hore.

Estas la unua « nokta flugado » pli ĝuste diri la unua nokta aŭto-vojaĝo.

Rulante plej rapide, proksime de Angoulème sed — ĉar li ne pripensis tion — sen reflektoroj, Levassor kaj lia mekanikisto plengorĝe kantis por resti vekitaj.

(Kelkajn jarojn pli poste nia kuraĝa Maryse Bastié, kiu rondiris ĉirkaŭ Le Bourget, de jam 36 horoj metis Kolonj-akvon sur siajn okulojn por ne fali teren).

Ĉirkaŭ tiu periodo oni kreis « Francian Aŭtomobilan Klubon ».

La plej granda danĝero estis la hundoj ; kiam aŭto perdis siajn ĉevalojn, tute simple oni haltis ; sed kiam ĝi alkroĉis hundon, estis aĉa aventuro ! La veturiloj estis stiritaj aŭ per kvazaŭa stirilo kun 2 maniloj, aŭ per ia patovosto. La stirilaro tute ne estis neinversigebla kaj se hundo alkroĉus radon, fatale okazus cirklosalto.

Tial generacioj de hundoj estis neniigitaj, kaj sendube pro tio iliaj posteuloj iĝis pli atentaj.

Léon Bollée ĵus ensceniĝis. En « Petit Journal »-oficejo li kontaktis S-ron Marinoni, la inventinto de rotacipresiloj, kaj aŭte veturigis lin tra Parizo. Kvankam 80 jara, S-ro Marinoni volis mem konduki. Aliaj samaĝaj vigluloj imitis lin.

— Ĉu jam problemo de la maljunuloj ?

— Jes, sed ni konfesu, ke estas miriga : pripensu, ke ni jam fulmiris : 50 km-hore !

La dukino de Uzès, kiu ĉiam antaŭis ĉiujn, kaj subtenis ĉiujn novajn ideojn, tiagrade, ke ŝi, maljuna rojalistino, estis la plej bona amikino de la revoluciulino Louise Michel, la dukino de Uzès, la unua deziris obteni sian 'cirkulad-permesilon ». Ne estis snobeco, sed energio ĉar nia 80 jara dukino ankoraŭ ĉaskuris en Rambouillet-arbaro.

Tiu ekzemplo naskis gravan sportan inan movadon ; ĝi pruvis, ke oni povas aŭte veturi sen esti frenezulino.

Sed sen pneŭmatiko, la aŭtomobilo estas tute ne komforta.

Ĉu vi konas la historion de la ĉevalo, kiu, pro ŝvelo, krevis ? Iun tagon, veterinaro Dunlop ekzamenis ŝvelintan ĉevalon. Li premis la ventron de la besto. Konklude li pripensis, ke la aero en la intestoj montras elementon plej bone elastan.

Rimarku : sur la Dunlop-pneŭmatikoj siluetiĝas barbulo : unu plua ! En 1889, troviĝis en Clermont-Ferrand inĝeniero Edouard Michelin kaj juna artisto, studento en Belaj Artoj : André Michelin.

De notario, de maljuna fraŭlino, de ekskapitano de kavalerio ili ĵus heredis povran kaŭĉuko-uzinon. Jen, subite, ili fariĝas uzinestroj.

Tuj kiam ili aŭdis pri Dunlop kaj liaj rimarkoj, la 2 viroj (la granda inĝeniero, kaj la genia publicisto — tiu, kiu kreis Bibendum) la 2 viroj sentis ĉion eble eltireblan el tiuj rimarkoj.

Unue, oni uzis la pneŭmatikojn sur bicikloj : oni konstatis, ke ne ĉiufoje ili krevis (kaj tamen en 1912, kiam pneŭmatiko kovris 1200 kilometrojn, oni opiniis tion sensacia).

La unuaj poraŭtaj pneŭmatikoj estis eksperimentataj sur ĉeval-veturilo ; fratoj Michelin devigis ilin al ekcesaj streĉiĝoj. Je la unua veturado ili krevis 30 fojojn. Feliĉe ke ripar-taĉmento akompanis la veturantojn !

Ankoraŭ en 1905, ĉe la Auvergne-kurado, tute proksime de Clermont-Ferrand, la fratoj Michelin havis 8 mekanikistojn por ĉiu veturilo : je ĉiu ĉirkaŭiro la 8 viroj malmuntis la pneŭmatikojn (ĉar oni ankoraŭ ne malmuntis la radojn) por ebligi al la vetkurantoj pluan rondiron.


Je tiuj kondiĉoj, Thery sukcesis atingi meznombre 80 km-hore — sen amortiziloj !

Kiam li estis 83 jara André Michelin proponis konstruigi aŭto-ŝoseon tra Parizo por mallongigi ties trairadon.

Ĉirkaŭ 1987, iun vesperon Ford ĵetiĝis kun sia veturilo inter la muroj de Détroit (kiu, pli poste, fariĝis tutmonda aŭto-ĉefurbo) ; la veturilo estis preta nur malfrue en la vespero. La nokto estis favora. Kun S-ino Ford ambaŭ ĉirkaŭiris la « dom-blokon ». Ŝi multe timis. Tamen ŝi diris al li « Henry, vi sukcesis. Ni esperu, ke ni vendos 8 — 10 veturilojn ! ».

Kelkajn jarojn poste Ford produktis unu veturilon sekunde.

El la libro « Nia veturilo kaj ni »
de Hervé Lauwick (1953)
(traduko S. Guillot)



Chrysler ses (1924) postulis ĉiutagan, ĉiusemajnan aŭ ĉiumonatan lubrikadon. Ĉiu posedanto nepre estis sperta mekanikisto, ĉar, la ĉapitro pri lubrikado en la « Prizorgarda Libro » konsistis el 63 paĝoj malgrandlitere presitaj.

Diversaj Rakontoj

LA HIRUNDO de Istvan Fekete

Sur la digo de l'rivereto tiutempe la salikoj malvolvis siajn foliojn kaj la urtiko komencis verdiĝi. Frua papilio zigzage flugis en la sunbrilo.

Ni kuŝadis sur la bordo. Jam tedis nin la flosado de l' paperboatetoj. Ni rigardis la akvon, la ĉielon kaj estis bonege kuŝi en la sunbrilo post la multegaj nebuloj de l' vintro.

Subite ekstaris mia amiko Petro Puska kaj kriante li montris al la aero.

— « Hirundon mi vidas, pri lentugoj ridas... » kaj li kuris al la akvo por lavi sian vizaĝon. Mi kuris post li. Niaj vizaĝoj estis malsekaj kaj ni ridis, kvankam neniu el ni havis lentugojn.

La hirundo faris vojkurbon en la aero kaj alteriĝis sur la elfluaĵo de l'rivereto. Ĝi trinkis iom da akvo kaj pepadis, kvazaŭ ĝi dirus ion al la rapidaj ondoj.

Petro montris grandan, rondan ŝtoneton :

— Ĉu vi povus ĝin trafi ?

— Jes, sed mi ne volas. — Kaj mi levis la ŝtoneton.

— Vi ne povus trafi ĝin. Tion diri ja estas facile...

La hirundo ankoraŭ ĉiam paŝetadis tie sur la kota elfluaĵo de l' rivereto kaj ĝi ne atentis nin. Povas esti, ke ĝi pensis pri la nesto, kiun ĝi konstruos el tiu koto, aŭ ĝi pensis pri la idoj, kiuj iam naskiĝos.

Mia brako eksvingiĝis, la ŝtono forflugis kaj la ekflugantan hirundon ĝi trafis en la aero.

Ni interrigardis rigidiĝinte. Subite finiĝis la printempo. Mi sentis amarecon, mia koro iĝis peza kaj tima.

— Vi diris tion...

— Mi nur ŝercis — balbutis mia amiko ; poste ni kuris al la hirundo.

La malgranda, fragila korpo konvulsiis, ĝiaj okuloj rigardis kun doloro kaj ĝiaj flugiloj disetendiĝis. Kvazaŭ gi volus defendi ion, poste ĝi restis senmova.

Mi sentis malĝojon, kiu polmopeze sidis sur miaj ŝultroj.

Ho ! Antaŭ kelkaj minutoj, kiel bele flugis tiu birdeto ; Kiel ĝi pepadis al la konataj akvoj... ĝi volis fari neston, kaj nun ĉio estas neripareble finita. Niaj okuloj eklarmis kaj ni ne povis rigardi unu la alian.

— Ni devas ĝin entombigi — plorsingultis Petro.

Mi ektimis. Mi pensis pri tio, ke birdon, kiu flugis en la blua ĉielo kaj sunbrilo, ni ne rajtas enterigi.

— Ne. Ne !

— Sed do ?

— Atendu !

Mi elektis la plej belan paperboaton kaj plenigis ĝin per malgrandaj floroj, ni kuŝigis la etan hirundon en ĝin. Ni karesis ĝiajn brilantajn plumojn, fermitajn okulojn kaj ni atendis. Io ankoraŭ mankis. Ni ankoraŭ sentis en nia koro la stultan pekon, kaj Petro estis la unua, kiu rekonsciiĝis.

— Do tiam ni diru al ĝi nian adiaŭon.

Li deprenis sian malgrandan ĉapelon kaj honte li kisis la mortintan birdeton. Ankaŭ mi kliniĝis al ĝi kaj ankoraŭ hodiaŭ mi sentas sur mia buŝo la tuŝon de ĝia mola plumaro.

La rivereto mallaŭte plaŭdis, kiam ni ekflosigis la malgrandan boaton, kaj ni paŝadis apud ĝi kun deprenita ĉapelo kaj kun granda malĝojo.

Ni paŝadis ĝis vesperiĝis kaj la rivereto atingis la grandajn kanejojn, kie plore susuris la pasintjara kaliko kaj la kanoj mute klinis sin antaŭ la sundio, kiu falis inter la nubojn.

De tiu tempo ĉiu hirundo estas kara por mi. Se printempe mi vidas ilin alveni : ankoraŭ nun mi deprenas mian ĉapelon kaj eldiras la praan salutparolon.

El la hungara : Anna SZEKELY.

KOMPLIKA KRISTNASKA-ARBO

Reproksimiĝas la granda mezvintra festo, Kristnasko kun siaj ĝojoj kaj antaŭzorgoj : Zorgoj... ? Jes... !

Kion aĉeti por edzo, edzino, infanoj, gefratoj, boparencoj kaj amikoj kiel kristnaskaj donacoj ? Kiel ŝpari monon por ĉio ?

Kiajn manĝajojn prepari por la festo ? Kiel trovi sufiĉan tempon por serĉi ĉion bezonatan en plenplenaj magazenoj, kiuj antaŭ Kristnasko similas abelujojn ?

Kaj oni ne forgesu aĉeti belan arbon kaj ornamaĵojn por ĝi. Ĉu ĝi devus esti densa aŭ maldensa, alta aŭ malalta... ?

Jes... kaj ankoraŭ grava afero, farenda : Oni ne forgesu dungi Kristnaskan patron, kiu disdonos

la aĉetitajn donacojn. Ankaŭ por pagi lian viziton devus resti ion da mono...

Fine la antaŭpreparoj estas faritaj, la festomanĝaĵojn sur tablo allogas lacegajn preparintojn. Oni ekbruligas la kandelojn, kaj la dungita Kristnaska-patro povos alveni.

En malgranda, idilia banurbo de la Norda lando surstrate promenas sinjoro sencele. En frosta aero dancadas neĝeroj. La urbo estas ornamita por la festo. Ankaŭ la naturo faris sian eblon, ornamis la arbojn per neĝo. En montrofenestroj de magazenoj trembrilas kandeloj sur branĉoj de Kristnaskaj arbetoj. Estas tago inter Kristnaska kaj Novjara festoj. Li ekstaras antaŭ unu el multnombraj montrofenestroj ; rimarkas la arbeton. Li ridetas, kvazaŭ li rememorus pri io amuza... Poste li daŭrigas sian promenadon direkte al redaktejo de la loka gazeto : — hezitas... fine decidas eniri renkonte sian bonan amikon, ĵurnaliston.

La scenejo : Laborĉambro de la ĵurnalisto : Li tajpas ĉe skribtablo : La sinjoro frapas sur la pordon. Aŭdinte voĉon : « eniru », li malfermas la pordon.

La sinjoro. — Saluton amiko ! Miaj piedoj frostas. Ĉu vi permesas al mi varmigi ilin iom kaj babili momenton ?

La ĵurnalisto. — Saluton ! Kompreneble ! Prenu seĝon kaj eksidu.

La sinjoro eksidas apud la hejtilo, ,prenas pipon kaj tabakon el sia poŝo ; prezentas tabakon al la ĵurnalisto admonante : Gustumu ja la tabakon, kiun mi ricevis de la Kristnaska-patro. Ambaŭ plenigas siajn pipojn kaj ekfumas.

La ĵurnalisto. — Ĉu vi bone pasigis la feston ? Ĉu la Kristnaska patro portis al vi bonajn donacojn ? Konklude el la tabako... certe bonajn...

S. — Mi ne povas plendi. La tuta festo tiel glate pasis, ke eĉ ne multe impostis mian monujon. Malgraŭ tio, ke mi devis aĉeti du kristnaskajn arbojn kaj elspezi por kelkaj aliaj bagatelaĵoj, mi sukcesis aranĝi miajn aferojn tiel ke... Sed kiel ? — Estu sekreto.

Ĵ. — Nu, du arboj ne estas alta prezo por Kristnasko.

S. — Por Krisnasko oni ĉiam devas pagi. Se tio ne tuŝas monujon, ĝi tuŝas ion alian.

Ĵ. — Ekzemple kion ?

S. — Vi scias ja, ke piceo ne ĉiam estis uzata kiel Kristnaska ornamaĵo. Tial ĝi preferas kreski kaprice kiel ajn. Ĝi iĝas pli volonte arbo, el kiu oni faros paperon, sur kiun oni skribos pac-kaj helpkontraktojn, laŭ kiuj : « Oni devas aŭskulti la piceon, ĉe kiu oni havas domon ».

Vidu, la unua arbo, kiun mi portis hejmen, ne taŭgis al la familio.

Ĵ. — Sed kial ?

S. — Tial, ĉar la familio postulis, ke oni metu ĝin en la angulon de la salono, kie ni ĉiam dum Kristnasko kutimis havi la arbon. Sed mi volis fari iom da ŝanĝo kaj starigi ĝin ĉe la plej malproksima muro de la salono.

Ĵ. — Kial ?

S. — Ĉar mi elektis la arbon en mallumeta mateno, kaj nur hejme rimarkis, ke ĉe unu flanko ĝi ne havis branĉojn. Ĉe aliaj flankoj estis des pli dense. Tie ĉe la muro, eĉ meze de la muro ĝi estus aspektinta kiel vera ornamaĵo de la salono. Precipe kun ĉiaj ornamaĵoj, brilantaj fadenoj, steloj, kandeloj kaj aliaĵoj, kiuj apartenas al kristnaska-arbo. Mi pensis, ke tiel oni ne rimarkus mankon de branĉoj ĉe unu flanko...

Ĵ. — Oni ne komprenis ?

S. — Ne : La « Cerbo » de la familio (= edzino) diris : « Alportu alian arbon ».

Ĵ. — Vi alportis ?

S. — Jes, mi alportis.

Ĵ. — Ĉu taŭgis ?

S. — Ne tute... Oni bezonis borilon, martelon, hakilon kaj multe da gluaĵo. Laŭ tio, kiom mi dehakis branĉojn el la nova kaj malnova arboj, mi boris, gluis kaj najlis ilin ien ĉe la nova arbo. Laborante mi cerbumadis... kiel liberiĝi de la senespera laboro... Fine mi eltrovis diri al la « Cerbo » de la familio : Nek ĉi tiu borilo, nek la najloj eniras en stumpojn de branĉoj. Nome, mi estis jam gluinta, borinta kaj najlinta tiom da branĉoj ĉirkau la nova arbo, ke necesis aldoni en stumpojn de dehakitaj, kaj aliloken ligitaj branĉoj.

Ĵ. — Kiel sukcesis ?

S. — Nia ĉijara kristnaska-arbo staras en sia tradicia angulo en la salono tiel densa, tiel densa, ke... De la angula flanko mi devis mallongigi, aŭ tute desegi kelkajn branĉojn, ĉar por ĉi rezervita loko inter piano kaj ŝranko ne sufiĉis. Densaj estas branĉoj, sed ne multe da pingletoj. Sed kiu ne scias, ne rimarkas la mankon de sub ornamaĵoj de la arbo.

Ĵ. — Ĉu paciĝis fine ?

S. — Jes : Kiam alvenis kristnaska-patro, ni jam ridis. La « Cerbo » de la familio ricevis kiel donacon en koverto picean konuson kun skriba admono por venonta Kristnasko mem planti el semo laudezire belforman kristnaskan arbon.

— La « Cerbo » ankoraŭ mokdemandis : « Kial vi ne donacis al mi ankaŭ semojn de kristnaska-patro ? Tiel ni ŝparus venontjare aldone 10 markojn, kiujn ni devis pagis por lia vizito ».

— Ne troigu ! — mi diris —. Kristnaska-patro kreskas ja konate malrapide. Apenaŭ estus plenkreska post unu jaro...

Bonan Kristnaskon al ĉiuj esperantanoj !

Kerttu Väätänen.

(La dialoga parto, kareldialekta babilado estas verkita de plumnomo « Lassi », kaj aperigita en finna gazeto « Karjala ». Transformita de Kerttu Väätänen).

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Ĉar nia antaŭa numero aperis iom malfrue, ni sciigas al ĉiuj partoprenantoj, ke ni akceptos la respondojn al la du unuaj problemoj (numero 5 — sept-oktobro 68) ĝis la fino de januaro 1969, kondiĉe ke ili alvenu samtempe kun la respondoj al la du ĉimonataj problemoj.

Bonvolu sendi viajn respondojn kun (almenaŭ unufoje) banderolo de la gazeto, rekte al :

S-ro P. CHEVALIER
19, boulevard Gabriel-Lauriol
44 — Nantes, Francujo

—0—0—0—0—0—0—

UNUA PROBLEMO (20 poentoj)

En la ĉisuba rakonto sin kaŝas dek eraroj pri gramatiko aŭ lingva korekteco. Bonvolu korekti ilin. Estos kalkulitaj 2 poentoj por ĉiu eraro ĝuste korektita, sed estos forprenita 1 poento por ĉiu « nekorekta korektado ».

La festo de la kverko

En arbaro de antikva Armoriko granda kverko sidas. Ĉirkaŭ la arbo blanke vestitaj virgulinoj dancas kaj kantas la laŭdon de la kverko. Sur plej malalta branĉego kreskas dubeverda visko. La kanton aŭdas la visko, ĝi klinigas kaj murmuretante, alparolas la junulinojn kun afablaj vortoj : « Pravaj vi estas, ho filoj de Armoriko, kiam vi laŭdas la kverkon ! Ido de la kverko, neniu pli alta ol mi ŝatas lian potencon, lian belecon. Dolĉa estas, virgulinoj, via kanto al mia ida koro ; kverkido, mi ankaŭ estas kverko, kaj rajte fieriĝas pri tiu nomo ! ».

Sed la estrino de la blanke vestita ĥoro, tenante en mano la ora falĉileto, respondas kun serioza severa voĉo : « Ido de la kverko vi ne estas, ho visko, ne ! El ĝi vian vivon vi ĉerpas ; nur dank'al li vi povas kreski ; tamen vi vivas nur por ĝin pereigi. Ido de la kverko vi ne estas, ho, visko, ne... ». La virgulinoj ĉirkaŭas la blondharan estrinon ; siaj blankaj brakoj ŝin suprenlevas. Per la ora falĉileto ŝi fortranĉas la dubeverdan viskon. Ĝi falas ĉe la piedoj de la virgulinoj, kiuj ĝin dispremas dancante kaj kantante la laŭdon de la eterne potenca kverko.

DUA PROBLEMO (10 poentoj)

Silab-enigmo.

AS — BA — BLU — BO — DA — DO — FOJ — GRI — JUN — KAR — KES — KI — KO — KRI — KUR — LAS — LO — LO — LOJ — MO — NO — PAJ — PO — PO — RIS — RON — SUR — TA — TAB — TAL — TO — TO — TUR — VES — ZA — ZO —

El la supraj 36 silaboj formu 18 dusilabajn kaj kvinliterajn vortojn kun la sekvantaj signifoj :

1 — Subtera blinda mambesto. 2 — Tre laŭte parolas. 3 — Kreskaĵo por fari matojn kaj korbojn. 4 — Nigraĵo por hejto. 5 — Manĝata riverfiŝo. 6 — Pikilhava insekto. 7 — Malunua. 8 — Ne havanta aŭdpovon. 9 — Malrekta. 10 — Brutnutraĵo. 11 — Seka grentrunko. 12 — Koloro. 13 — Manikhava vestaĵo. 14 — Ligna skatolego. 15 — Meblo. 16 — Kvincent paperfolioj. 17 — Brue spiri dormante. 18 — Birdo.

Post tio prenu el ĉiu vorto unu liter-paron (ne silabon, sed du najbarajn literojn), tiel ke ili en la numerita vico kune donu interesan aserton, faritan de la franca reĝo Francisko, la Unua pri la ĉefurbo de Francujo.

AMUZAJ PROBLEMOJ

(apartaj de la konkurso)

Solvoj de la lastaperintaj problemoj


La ĝardenisto. — Ni povas konsideri, ke la nombro da semoj estas x3. Ĉiu kuba nombro dividita per 7 lasas restajon 6, 1 aŭ 0. Ĉar la demando estis : kiom da semoj (plurale) la respondo estas 6.

Ludo de eraroj. — La trovotaj eraroj estas : anteno de la papilio ; naĝilo de la fiŝo ; tigo de la nimfeo ; nazo de la suno ; beko de la cikonio ; kruro de la rano ; aerveziko ; nubo.

Novaj problemoj

Dedukto : Tri viroj, kiujn ni nomos A, B,C, devas sperti dedukto-teston. Sur ĉies frunto estas farita kruco kolora. Oni diras al ili, ke tiuj krucoj povas esti bluaj aŭ blankaj. Oni poste enirigas ilin en senhoman ĉambron. Neniu el la viroj konas la koloron de « sia » kruco. Estas malpermesite al ili paroli unu al la alia. Oni diras al ĉiu el ili, ke li rajtas eliri el la ĉambro se li vidas du blankajn krucojn aŭ se li deduktas la koloron de sia kruco. A rimarkas, ke B kaj C havas bluajn krucojn kaj post mallonga pripensado eliras ĉar li trovis la solvon. Kiamaniere li trovis ĝin ?

La bona kalkulanto. — Se vi estas bona kalkulanto vi povos adicii ĉiujn nombrojn, kiuj ĉirkaŭas la junulinon. Poste vi adicios ankaŭ la nigrajn punktojn. Kiu estas la fina sumo ?



GRAMATIKO PER BONHUMORO

« La prepozicion « per » post pasivo ni povas uzi nur en tia okazo, se ĝi troviĝas antaŭ vorto, kiu esprimas ne la aganton mem, sed rimedon uzitan de alia aganto... La prepozicio « de » post pasivo ĉiam montras, ke, se ni aliformigus la pasivan formon en aktivan, la vorto, kiu havas antaŭ si la diritan prepozicion, fariĝus subjekto de la frazo ».

L.L. Zamenhof - Lingvaj respondoj.



— Virinoj liberiĝas per arto.



— Vi ne iom hontas esti nutrata de via edzino ?



— Mi estas ĉiam ravita de la ferio-memoraĵoj.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (39 aŭst. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (70 fr.).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH BA2 5Rx (12 ŝil).

Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (1,50 us. dol.).

Finnlando : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk : Tu 60253 (7 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33, - pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (5,6 mk.).

Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO 90 pes.).

Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (840 lir.).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (540 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1260 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (5 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg. 56, LAMBERTSEDER (10 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (50 zl.).

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, p.k. 1412, BUKUREŜTI - 6.

Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk. 157007 (8,4 kr.).

Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (1,50 dol.).

Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN.

Supplément au n° 6 de 1968, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Le Conseil d'Administration réuni le 20 octobre a eu bien du travail à faire. La nécessité de mettre au point un contrat de travail précis pour le nouveau ménage qui doit prendre son service en décembre, a occasionné des discussions longues mais fructueuses. L'expérience avait montré qu'en pareille matière il faut établir un texte clair fixant des limites précises afin que soient rendues sinon impossibles du moins improbables les différences d'interprétation. Je crois que le Conseil est arrivé à mettre sur pied un contrat non pas idéal sans doute, mais donnant des avantages sérieux au ménage du jardinier en sauvegardant les intérêts de la Maison.

L'établissement du programme 1969 a été un peu compliqué par l'obligation de repousser la Semaine Culturelle d'U.F.E. à juillet, puisqu'à Pâques aura lieu le Congrès commun franco-allemand à Strasbourg. Nous pensons que ce programme apportera au plus grand nombre de nos amis ce qu'ils désirent. L'introduction dans ce programme d'un stage pour responsables de cours et de groupes était nécessaire. Nous espérons que la date proposée, vacances de février, conviendra aux intéressés. Nous avons déjà quelques inscriptions. Aux cours habituels du début juillet nous avons joint un cours de français usuel par l'espéranto. L'expérience aura-t-elle plus de succès qu'elle en avait eu il y a quelques années ? Nous le verrons. L'an dernier Mme Gerrier avait proposé pour le mois d'août une activité nouvelle : la photographie. Grâce à sa compétence et au travail de son mari qui avait installé le laboratoire, cette activité avait été un grand succès tant par l'intérêt qu'elle avait suscité que par la qualité et l'originalité des réalisations. En 1969 une nouvelle activité sera proposée à la même période : le théâtre. M. Thierry a accepté de mettre son expérience à la disposition de ceux que l'art théâtral intéresse.

Voilà quelles sont les quelques modifications que le programme 1969 comportera. A vous de nous dire si nous avons eu raison de les apporter. Nous avions espéré dédier en partie une période à la musique. Les dates proposées aux organisateurs ne pouvant pas leur convenir nous avons dû, provisoirement du moins abandonner cette idée. Nous essaierons de la reprendre une autre année. L'espéranto aux service des arts, n'est-ce pas une idée à retenir ?

P. BABIN.

NOTRE REVUE

La plupart des retardataires ont réglé leur abonnement. Nous les en remercions. Nous avons enregistré de nouveaux abonnements. C'est bien mais c'est encore insuffisant. il en faudrait encore de nombreux pour que la revue puisse se développer. Vous, nos amis, serez certainement les meilleurs propagandistes. Nous comptons sur vous.

ABONNÉS BIENFAITEURS 1968

Liste N° 7

Mlle	Bargeot (Nièvre)	12 F.
M.	Roux (Paris)	12 F.
Mme	Lacrampe (Haute-Garonne)	12 F.
Mme	Pellerin (Maine-et-Loire)	12 F.
Mme	Marquis (Ille-et-Vilaine)	12 F.
M.	Dutrois (Loir-et-Cher)	12 F.
S-ro Mee	(Grande-Bretagne)	12 F.
Mlle	Baubonne (Haute-Marne)	12 F.
Mme	Fabry (Maroc)	12 F.
M.	Lautrette (Vienne)	12 F.
M.	Jacquesson (Vienne)	12 F.
M.	Michaud (Seine-St-Denis)	12 F.
Mme	Trésorier (Doubs)	12 F.
M.	Gimbert (Puy-de-Dôme)	12 F.
M.	Alekknavicius (U.R.S.S.)	12 F.
M.	Guérin (Loire-Atlantique)	12 F.
Mlle	Guyon (Cher)	12 F.
M.	Pialla (Drôme)	12 F.
	Total :	**216 F.**

ABONNÉS BIENFAITEURS 1969

Liste N° 2

Mme	Pellerin (Maine-et-Loire)	12 F.
M.	Tomasella (Lot-et-Garonne)	15 F.
M.	Curnelle (Nord)	15 F.
M.	Michaud (Plaine St-Denis)	12 F.
Mme	Trésorier (Doubs)	12 F.
M.	Baronnet (Indre)	12 F.
Mme	Gimel (Calvados)	12 F.
Mlle	Duchamps (Lot-et-Garonne)	12 F.
Mme	Humm (Vaucluse)	12 F.
Mlle	Bargeot (Nièvre)	12 F.
Mme	Ferrut (Doubs)	12 F.
Mlle	Leclercq (Somme)	12 F.
M.	Olivaux (Loire-Atlantique)	15 F.
M.	Valluet (Loiret)	12 F.
Mlle	Lévy (Var)	12 F.
M.	Rabineau (Loir-et-Cher)	12 F.
Mme	Fort (Aube)	12 F.
Mme	Mouneyrou (Lot-et-Garonne)	12 F.
	Total :	**225 F.**

NOS PEINES

Nous avons appris la mort de M. Tomialoje, père de Mme Gerrier. M. Tomialoje avait accompagné sa fille deux fois à Grésillon et chacun avait pu apprécier sa gentillesse. A Mme Gerrier et à son mari nous présentons notre affectueuse sympathie et celle de tous ceux qui les connaissent.

●

NOS JOIES

Le fils de nos amis Mme et M. Jack Rousseau, trésorier de U.F.E., s'est marié dernièrement. A Pierre et à sa jeune femme nous adressons tous nos vœux de bonheur.

CONSEIL D'ADMINISTRATION

20 OCTOBRE 1968

Présents : M. Babin, M. Bodereau, M. Boyet, M. Chevalier, M. Ciret, M. Cheverry, M. Coussé, M. Dairon, M. Gerrier, M. Guillot, M. P. Jacquesson, M. R. Jacquesson, M. Jelenc, Mlle Levrard, M. Métivier, Mme Micard, Mme Thierry, Mlle Vazon.

Excusés : M. Bénistant, Mlle Berthelot, M. Guillaume, M. Philippeau.

Situation financière

M. Babin informe le Conseil que les disponibilités s'établissaient, au 16 octobre 1968 de la façon suivante :

Caisse	.....	1.488,97 Fr.
Banque	.....	6.494,13 Fr.
C.C.P.	M.C.E.	29.418,81 Fr.
C.C.P.	K.K.	5.533,59 Fr.

M. Coussé dispose de 5.233,90 Fr. au C.C.P. et de 2.001,,41 à la Caisse d'Epargne.

M. Babin donne lecture d'une lettre de Mlles Schirber qui demandent un versement anticipé de la somme qui doit être versée le 1er janvier 1969. Le Conseil décide de s'en tenir à l'accord signé avec Mlles Schirber qui prévoit les versements en janvier de chaque année : un versement anticipé serait en effet très préjudiciable à l'équilibre du bilan financier de l'année 1968.

Un bilan des recettes de l'été 1968 fait ressortir une baisse dans les recettes de séjours due à l'annulation des passages de groupes qui se font généralement en mai et juin. Cependant on note une augmentation des recettes de librairie, souvenirs, boissons.

M. Coussé évoque la nouvelle législation de la S.S. qui demande une cotisation patronale sur la somme versée par l'employeur au titre de cotisations ouvrières. Il est décidé de déduire désormais cette cotisation ouvrière du salaire porté sur le bulletin de paie.

Etablissement d'un contrat pour un nouveau ménage de jardinier et cuisinière.

M. et Mme Guillois n'ayant pas respecté un certain nombre de règles stipulées dans le contrat qu'ils avaient signé, celui-ci n'a pas été renouvelé cette année. Il est donc nécessaire de trouver un nouveau ménage susceptible de remplacer M. et Mme Guillois. Afin d'essayer d'éviter toute interprétation abusive, il est décidé de présenter aux éventuels candidats à cette place un contrat plus précis. Une discussion très longue a abouti à la mise au point d'un tel contrat. Les clauses nouvelles les plus importantes précisent par exemple que la cuisine sera faite par un spécialiste pendant la période la plus difficile (15 juillet - 31 août) ; l'élevage d'animaux en trop grand nombre et, de façon générale, l'utilisation des terrains ou bâtiments pour l'usage privé du ménage ne seront pas admis ; enfin un délégué du C.A. sera chargé de l'organisation et de la surveillance, au cours de l'année, des travaux du jardinier.

M. Babin informe le C.A. qu'un certain nombre de demandes d'emploi ont déjà été reçues. Il ressort des lettres reçues et des informations données par des personnes présentes que deux de ces demandes peuvent être prises en considération pour l'instant.

Bilan de l'Eté 1968.

1er - 21 juillet : Cours d'Esperanto. Ce cours fait par M. Ribot a attiré très peu de monde.

21 juillet - 4 août : Cette période a été partagée en deux : la première semaine a été consacrée à un séminaire sur les problèmes d'organisation du mouvement esperantiste, avec la participation de MM. Lapenna T. Sekelj, Thierry, Bekker, Bormann. Ce séminaire a permis aux nombreuse personnes présentes d'assister à d'excellentes conférences. Toutefois certaines personnes ont été déçues par le contenu de ces conférences qui auraient surtout été intéressantes pour des spécialistes. Pendant la deuxième semaine les quelques personnes qui restaient ont assisté à des conférences sur des sujets divers et participé à la première excursion à Nantes qui a remporté un très vif succès.

4 - 25 août : Cette période a connu son succès habituel. Les cours ont été assurés par Mlle Turbillon pour le premier degré, Mme Gerrier pour le 2e degré et M. Babin pour le 3e. M. et Mme Dairon assuraient respectivement la reliure et la vannerie. Une nouvelle activité est venue, cette année, s'ajouter aux autres : la photographie dirigée par Mme Gerrier. Cette activité, comme les autres d'ailleurs, a beaucoup intéressé les participants.

25 août - 4 septembre : les cours d'esperanto faits par M. Ribot ont été suivis de façon relativement importante cette année.

Projets de stages.

28 décembre - 3 janvier : stage organisé par SFELO avec un programme culturel. Compte tenu des frais qu'entraîne un stage à cette époque, il est demandé aux organisateurs que les participants soient au moins au nombre de 20 pendant tout le stage et qu'une partie du séjour soit payée d'avance.

M. et Mme Babin assureraient l'administration de ce stage. Février 1969 : Mme Vincent a proposé d'organiser pendant les vacances de février un stage pour responsables de cours et de groupes (une série de cours dans chacune des semaines de vacances).

Administration : M. et Mme Ciret.

3 - 7 avril : Stage des Universités Populaires.

Administration : M. et Mme Guillot.

7 - 13 avril : Cours d'initiation à l'enseignement par la méthode directe et cours de pratique de l'Esperanto.

Administration : M. et Mme Jelenc.

29 juin - 13 juillet : 2 cours d'Esperanto. Mlle Vazon accepte d'assurer le premier Degré.

Administration : M. et Mme Cheverry.

13 - 20 juillet : Semaine culturelle de l'U.F.E. organisée par M. Boyet.

Administration : M. et Mme Guillot.

20 juillet - 3 août : Semaines internationales. Si les dates conviennent, il y aura pendant cette période, un stage de musique et des conférences.

Administration : M. et Mme Rabin.

3 - 24 août : les 3 cours habituels auront lieu suivuis des examens. A la reliure, à la vannerie et à la photo viendra s'ajouter l'initiation au théâtre dirigée par M. Thierry.

Administration : M. et Mme Babin.

24 août - 7 septembre : Séminaire et cours organisés par U.F.E.

Administration : M. et Mme Ciret.

Prix de séjour.

Compte tenu de l'augmentation des prix déjà constatée, il est décidé d'augmenter les prix de journée de 2 francs pour les séjours de plus de 3 jours et de 3 francs pour les séjours de moins de 3 jours. Un prix global, plus intéressant, sera proposé aux personnes qui séjourneraient pendant la durée complète d'un stage.

Travaux divers.

La situation financière ne permettra pas de travaux importants cette année.

Un projet de Golf miniature est présenté par M. Ciret. M. Ciret chiffrera la réalisation de ce projet.

L'ordre du jour étant épuisé, la séance est levée à 18 heures.

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, science à notre Service Librairie.

Adresser commandes et chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
49 - Baugé
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de **5 Fr.**

Le catalogue a paru dans le dernier numéro. Un autre exemplaire peut vous être envoyé sur demande.

NOS SÉJOURS

NOEL à Grésillon : Le stage prévu par SFELO pour la période du 28 décembre au 3 janvier a dû être annulé. En effet, le nombre d'inscriptions était nettement insuffisant et ne pouvait pas permettre l'ouverture du château à cette époque de l'année. Nous le regrettons vivement mais espérons que le programme qui s'annonçait intéressant pourra être repris à une autre période.

Février : Si le nombre des intéressés est suffisant, un stage pour animateurs de groupes et responsables de cours aura lieu pendant les vacances scolaires de Février. Ecrire dès maintenant, en précisant quelle semaine vous intéresserait le plus à : S-ino VINCENT, rue des Oiseaux, 27 - Les Andelys.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ
de **P. Babin**
Prix : **8,50 F.**

NOS COURS
PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.